ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




**Papo Benedikto la 16a rezignis je la petra servado**

Numero 1-3/2013

Januaro-Marto 2013

**JARKOLEKTO 110 - N. 1098-1100 - Januaro/Marto 2013**
*Finpresita la 05.03.13* — Finito di stampare il 05.03.13

**Sur la kovrilo:** *La 265a Posteulo de Petro rezignis. Ĉi tiu numero de EK revuas la vivon de Jozef Ratzinger kaj lian papadon kiel nia amata Benedikto la 16a. OREMUS PRO PONTIFICE.*

## ENHAVO

**PAPO BENEDIKTO LA 16A REZIGNIS JE LA PETRA SERVADO**

Lia **anonco** dum la Konsistorio de la 11a de februaro 3
Komento aperinta en la vatikana ĵurnalo **"L'Osservatore romano"** 4
La unua **parolado** de la Papo al la fideluloj post la anonco 5
Noto de la **prezidanto** de IKUE 5
Biografio de **Jozef Ratzinger** antaŭ la papado 6
Papo Benedikto scias pri **Esperanto** 7
La ĉefaj **eventoj** de lia papado 8

**ILI FORLASIS LA SOJLON DE PETRO**

**Historio** de la Papoj, kiuj rezignis dum la jarmiloj: Klemento, Pontiano 12
Silverio, Benedikto la 9a 13
Celestino la 5a 15

**66a IKUE-KONGRESO**

**13a ĝis 20a de julio 2013, Kalwaria Zebrzydowska, Pollando**

Ĉiuj informoj pri loĝeblecoj kaj la aliĝilo de **"Nia 66a"** 17

**FUNEBRE** 20

**Bibliaj Tagoj 2013** 20

**Radio Vatikana**, 20

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

La anoncon, en la latina lingvo, li donis je la fino de la publika ordinara Konsistorio de lundo la 11an de februaro

# Papo Benedikto la 16a rezignis je la petra servado



Karegaj Fratoj,

mi arigis vin pro ĉi tiu Konsistorio ne nur por la tri sanktproklamoj, sed ankaŭ por informi vin pri decido de granda graveco por la vivo de la Eklezio. Post plurfoja ekzameno de mia konscienco fronte al Dio, mi atingis la certecon, ke miaj fortoj, pro alta aĝo, ne plu estas taŭgaj por plenumi laŭ taŭga maniero la petran servadon.

Mi tre bone konscias, ke ĉi tiu servado, pro ĝia spirita esenco, devas esti plenumata ne nur per faroj kaj per vortoj, sed, ne malpli, suferante kaj preĝante.

Tamen, en la hodiaŭa mondo, subjekto de rapidaj ŝanĝiĝoj kaj agitita de problemoj el granda reliefiĝo por la vivo de la kredo, por regi la ŝipon de sankta Petro kaj anonci la Evangelion, necesas ankaŭ energio ĉu de la korpo, ĉu de la animo, energio, kiu dum la lastaj monatoj en mi malkreskis tiom, ke mi devas agnoski mian malkapablon bone administri la paŝtistan servadon al mi konfiditan.

Pro tio, bone konscianta pri la graveco de ĉi tiu ago, kun plena libereco mi deklaras, ke mi rezignas je la paŝtista servado de Episkopo de Romo, Posteulo de Sankta Petro, al mi konfidita de la Kardinaloj la 19an de aprilo 2005, tiel, ke ekde la 28a de februaro je la horo 20a, la seĝo de Romo, la seĝo de Petro, estos vakanta kaj oni devos kunvoki, fare de tiuj, kiuj estas kompetentaj, la Konklavon por la elekto de la nova Supera Pontifiko.

Karegaj Fratoj, mi dankas vin verkore pro la tuta amo kaj laboro, per kiuj vi portis kun mi la pezon de mia paŝtista servado, kaj mi petas pardonon pro ĉiuj miaj malperfektaĵoj.

Nun ni konfidu la Sanktan Eklezion al la prizorgo de ĝia Supera Paŝtisto, Nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj ni petegu lian sanktan Patrinon Marian, por ke Ŝi asistu per sia patrina boneco la Kardinalojn por la elekto de la nova Supera Pontifiko.

Koncerne min, ankaŭ estonte mi volos servi el mia tuta koro, per vivo dediĉita al preĝado, la Sanktan Eklezion de Dio.



L'OSSERVATORE ROMANO

Benedetto XVI lascia il pontificato

Il futuro di Dio

Ĉefartikolo de la direktoro de la vatikana ĵurnalo "L'Osservatore Romano", Giovanni Maria Vian

# La estonteco de Dio

Ĝi estas evento senprecedenca, kaj konsekvence la informo tuj trakuris la tutan mondon: la rezigno de Benedikto la 16a je la papado. Kiel la Papo mem anoncis per simpla soleno fronte al grupo da kardinaloj, ekde la vespero de la 28a de februaro la episkopa sidejo de Romo estos vakanta kaj tuj poste oni arigos la konklavon, por elekti la posteulon de la apostolo Petro. Tion oni klarigas en la mallonga teksto, kiun la Papo verkis rekte en la latina kaj kiun li legis dum la konsistorio.

La decido de la Papo estis alprenita antaŭ multaj monatoj, post la vojaĝo al Meksikio kaj Kubo, kun diskreteco, kiun neniu povis rompi, kaj post «plurfoja ekzameno» de la propra konscienco «fronte al Dio» *(Conscientia mea iterum atque iterum coram Deo explorata)*, pro la kresko de la aĝo. Benedikto la 16a klarigis, per la klareco propra al li, ke liaj fortoj «ne plu estas taŭgaj por plenumi laŭ adekvata maniero» la kolosan taskon petitan de la elektito, «por regi la ŝipon de sankta Petro kaj anonci la Evangelion».

Pro tio, kaj nur pro tio, la Roma Pontifiko, «bone konscianta pri la graveco de ĉi tiu ago, kun plena libereco» *(bene conscius ponderis huius actus plena libertate)* rezignas je la paŝtista servado kiel episkopo de Romo al li konfidita la 19an de aprilo 2005. Kaj la vortoj, kiujn Benedikto la 16a elektis, indikas laŭ travidebla maniero la respekton de la kondiĉoj preskribitaj de la kanonjura kodo koncerne la demision el tasko senkompara en la mondo pro ĝia vera pezo kaj spirita graveco.

Estas konate, ke kardinalo Ratzinger neniel ajn celis la elekton al papado, unu el la pli rapidaj en la historio, kaj ke li akceptis ĝin per la simpleco propra de tiu, kiu vere konfidas sian vivon al Dio. Pro tio Benedikto la 16a neniam sentis sin sola, en aŭtentika kaj ĉiutaga rilato kun Tiu, Kiu amoplene regas la vivon de ĉiu homa estulo kaj en la realaĵo de la kunuleco de la sanktuloj, subtenata de la amo kaj de la laboro de la kunlaborantoj, kaj subtenata de la preĝado kaj simpatio de multegaj personoj, kredantoj kaj nekredantoj.

Sub ĉi tiu lumo oni devas legi ankaŭ la rezignon je la papado, libera kaj ĉefe konfidoplena je la providenco de Dio. Benedikto la 16a scias bone, ke la papa servado «pro ĝia spirita esenco» povas esti plenumata ankaŭ «suferante kaj preĝante», sed li substrekas, ke «en la hodiaŭa mondo, subjekto de rapidaj ŝanĝiĝoj kaj agitita de problemoj el granda reliefiĝo por la vivo de la kredo», por Papo «necesas ankaŭ energio ĉu de la korpo, ĉu de la animo», energio, kiu en li malpliiĝas nature.

En la vortoj adresitaj al la kardinaloj, unue mirigitaj kaj poste kortuŝitaj, kaj per sia decido, kiu ne havas kompareblajn historiajn precedentojn, Benedikto la 16a elmontras klarmensecon kaj humilecon, kiu estas antaŭ ĉio, kiel li iam klarigis, aliĝo al la realaĵo, al la tero *(humus)*. Tial, sentante sin ne plu kapabla «bone administri» la paŝtistan servadon al li konfiditan, li anoncis sian rezignon. Per decido humane kaj spirite ekzemplodona, en la plena matureco de papado, kiu ekde la komenco kaj dum preskaŭ ok jaroj, tagon post tago, ne ĉesis mirigi kaj kiu certe postlasos profundan spuron en la historio. Tiu historio, kiun la Papo legas kun konfido je la signo de la estonteco de Dio. *("Oss. Rom.", 11-12/02/2013)*

# «Mi faris tion en plena libereco por la bono de la Eklezio»

*Per ĉi tiuj vortoj Benedikto la 16a anoncis merkrede la 13an de februaro ankaŭ al la miloj da fideluloj, kiuj ĉeestis en la aŭlo Paŭlo la 6a en Vatikano, por la antaŭlasta ĝenerala aŭdienco de la papado, sian intencon forlasi la petran servadon. Akceptita ĉe la eniro de vera ovacio, li estis plurfoje interrompita de amoplenaj aplaŭdoj dum sia alparolo.*




***"Tagoj por mi ne facilaj, preĝu por mi"***

«Karaj fratoj kaj fratinoj, kiel vi scias, mi decidis...» *(aplaŭdoj)*. Estas la horo 11.45 en Romo, kiam Benedikto la 16a eldiras **la** vortojn komence de ĝenerala aŭdienco, kiu ne estas kiel la aliaj, kiel neniu alia. Kaj la 15 sekundoj da aplaŭdoj, kiuj tuj interrompas lian parolon, estas la plej tuja esprimo, kiun la komunaj fideluloj trovas por liberigi emociojn pene retenitajn dum 48 horoj, ekde la antaŭa lundo, la 11an de februaro, kiam la Papo anoncis sian rezignon.

Poste la Papo daŭrigis per firma voĉo, por rediri, rigardante la okulojn de la Popolo de Dio, la eksterordinaran agon, kiun la Spirito konsilis al li pro amo al la Eklezio. «Dankon pro via simpatio. Mi decidis rezigni je la paŝtista servado, kiun la Sinjoro konfidis al mi la 19an de aprilo 2005. Mi faris tion en plena libereco por la bono de la Eklezio, post longa preĝado kaj ekzameno fronte al Dio de mia konscienco, bone konsciante pri la graveco de tia faro, sed same konsciante, ke mi ne plu kapablas plenumi la petran servadon per tiu forto, kiun ĝi postulas».


«Min subtenas kaj min prilumas la certeco, ke la Eklezio estas de Kristo, kiu neniam malhavigos sian gvidadon kaj sian prizorgon. Mi dankas ĉiujn pro la amo kaj la preĝado, per kiuj vi akompanis min.... dankon! Mi sentis preskaŭ fizike, dum ĉi tiuj tagoj por mi ne facilaj, la forton de la preĝado, kiun la amo de la Eklezio, via preĝado, alportas al mi. Daŭrigu preĝi por mi, por la Eklezio, por la estonta Papo. La Sinjoro gvidos nin».



LA PREZIDANTO DE IKUE PRI LA REZIGNO DE LA PAPO

Ni estis skuitaj, sed trankvile konsciaj, ke "La Eklezio estas de Kristo, Kiu ne mankigos al ĝi sian gvidadon kaj prizorgon". Kiel esperantistaj katolikoj vokataj al ekumena dialogo, ni demandas al ni, kiujn postsekvojn ĉi tiu gesto havos, koncerne niajn rilatojn kun la aliaj kristanaj Eklezioj kaj Komunumoj. Ni scias, ke unu el la malfacilaĵoj estas ĝuste la figuro de la Papo, taksata kiel neeksigebla Vikario de Kristo. Nun, ĉi-foje, li prezentas sin simple kiel Episkopon de Romo, kiu humile agnoskas sian malfortecon. Lia gesto estas ekzemplodona ankaŭ interne de nia Eklezio, kies vizaĝo - kiel redeklaris Benedikto la 16a mem dum la prediko por la ĉi-jara Cindromerkredo - "estas foje misfigurita de la kulpoj kontraŭ la unueco" kaj "de la dividoj en la eklezia korpo".

*Giovanni Daminelli*



# VIVO DE JOZEF RATZINGER ANTAŬ LA PAPADO

Naskita la 16an de aprilo 1927 en Marktl am Inn, Germanio, Joseph Ratzinger estas ido de malnova familio de terkultivistoj de Suda Bavario. Liaj gepatroj, ne aparte riĉaj, klopodis havigi al li dignan edukon, tial fronte al kelkaj malfacilaĵoj dum kelka periodo lia patro mem, polica komisaro, prizorgis lian instruadon.

Kardinalo Joseph Ratzinger estis unu el plej gravaj roluloj de la roma Kurio. Li estis nomumita de Johano Paŭlo la 2a en 1981 Prefekto de la Kongregacio por la Doktrino de la Kredo, prezidanto de la Papa Biblia Komisiono kaj de la Internacia Teologia Komisiono. La 6an de novembro 1998 li estis nomumita vic-dojeno de la kardinalaro. La 30an de novembro 2002 Papo Johano Paŭlo la 2a konfirmis lian nomumon kiel dojenon de la kardinalaro. El ĉiuj kardinaloj de la konklavo de 2005 li estis unu el la tri kardinaloj-elektantoj nomumitaj de Paŭlo la 6a.

Lia infaneco estis markita de la eventoj de la granda historio. Kiam li estis adoleskanto, fakte, en lia lando furoris la detruado de la dua mondmilito. Kiam la germanaj trupoj komencis esti en aĉa situacio, oni varbis lin por la kontraŭaviadaj helpservoj. La religia vokiĝo komencis tamen jam maturiĝi en li, ankaŭ kiel reago al ĉiuj hororaĵoj, kiujn la milito estigis.

Kelkajn jarojn poste Joseph Ratzinger komencas viziti la Universitaton de Munkeno, por komenci sufiĉe "laikajn" studojn pri filozofio, sen tamen preterlasi la pliprofundigojn diktatajn de teologio. Lia soifo je kono estas tioma, ke li, por kiel eble plej multe ĉerpi el la fontoj de la spirita kono, daŭrigas siajn grandajn studadojn ankaŭ en la supera lernejo pri filozofio kaj teologio de Freising.

La 29an de junio 1951 li pastriĝis. Lia pastra servado ne limiĝas je predikoj aŭ mescelebro, sed li disponigas sian freŝan saĝecon, kiu ĵus konkretiĝis en la tezoj pri teologio ("Popolo kaj domo de Dio en la doktrino de la Eklezio de sankta Aŭgusteno"), por la instruado: sperto, kiu daŭros dum pluraj jaroj ankaŭ per libera docenteco, kiun li akiris al si per eseo pri la laboro titolita: "La teologio de la historio de sankta Bonaventuro". Dum deko da jaroj Ratzinger instruis unue en Bonn kaj poste ankaŭ en Münster kaj Tubing.

Tiuj estis la 70-aj jaroj de la 20a jarcento, kaj la ĝenerala etoso ne estis certe favora por la Eklezio kaj ĝiaj reprezentantoj. Ratzinger — ne timigebla nek sekvanto de la momentaj modoj (ankaŭ de tiuj "intelektulaj") — eĉ plifirmigis sian ĥarismon interne de la ekleziaj institucioj, ankaŭ pere de ia penso-firmeco.

Jam ekde 1962 Ratzinger fariĝis sufiĉe konata internacinivele, intervenante kiel teologia konsilanto ĉe la 2a Vatikana Koncilio. En 1969 li fariĝis profesoro pri Dogmatiko kaj Historio de la Dogmoj ĉe la Universitato de Ratisbono, kies vicprezidanto li ankaŭ estis.

La 24an de marto 1977 Papo Paŭlo la 6a nomumas lin ĉefepiskopo de Munkeno kaj

Freising. La postan 28an de majo li ricevas la episkopan konsekron, la unua dioceza pastro, kiu, 80 jarojn post la antaŭa, surprenas la mastrumadon de la granda bavara Diocezo.




Paŭlo la 6a nomumis lin kardinalo dum la Konsistorio de la 27a de junio 1977.

La 5an de aprilo 1993 li eniris la ordon de la kardinaloj episkopoj.

Ratzinger estis prezidanto de la komisiono por la pretigo de la Katekismo de la Katolika Eklezio (1986-1992).

## PAPO RATZINGER SCIAS PRI ESPERANTO.

Dum sia papado Benedikto la 16a daŭrigis la tradicion eldiri la Paskajn kaj Kristnaskajn bondezirojn ankaŭ en Esperanto. Sed liaj kontaktoj kun la internacia lingvo datiĝis de foraj jaroj, kiam li havis okazon renkonti en Pollando (jaro 1983) du esperantistajn pastrojn, Magnani kaj Korytkowski. «Kun li ni iomete parolis pri latino kaj Esperanto en la Eklezio», raportis tiam pastro Magnani, kiu tiun saman vesperon ankaŭ vespermanĝis kun kardinalo Ratzinger. «Lia Eminenco ne montris sin malfavora al Esperanto», sciigis Magnani en 2005, post la elekto. Fotografaĵo de tiu renkontiĝo aperis frontpaĝe de EK n-ro 3-4/1983: en ĝi oni vidas kardinalon Ratzinger kun enmane la memorigilo de la sinkonsekro de IKUE al la Senmakula Koro, okazinta la 13an de majo 1982.

Multajn jarojn poste, kiel Papo, Ratzinger havis denovan eblecon rekte aŭdi pri Esperanto. Okaze de la 75-jariĝo de Radio Vatikana (fondita en 1931 de Pio la 11a) li vizitis la 3an de marto 2006 la domon, en kiu estas la redakcioj kaj produktada centro de la elsendoj. Dum la vizito la Papo ankaŭ trairis ĉiujn etaĝojn de la palaco, por viziti la diversajn redakciajn ĉambrojn.




La redaktoroj estis grupigitaj laŭ lingvaj grupoj. La redaktoro de la elsendo en Esperanto atendis la Papon kun la kolegoj de la armena, latva kaj litova sekcioj.

Akompanis la Papon pastro Federico Lombardi, ĝenerala direktoro de la Radio (hodiaŭ ankaŭ direktoro de la gazetara salono de la Sankta Seĝo). Unue li prezentis al la Papo la diversajn redakcianojn. Jen la transskribo de la interparolo pri Esperanto:

Pastro Lombardi: «Ĉi tie estas armenoj, litovoj, latvoj kaj ankaŭ Esperanto».
La Papo: «Ankaŭ Esperanto! Mi havas bone ĉeestantan en mia menso Esperanton».
Pastro Lombardi: «Ni havas la asocion de la katolikaj esperantistoj, kiuj pretigas la programon en Esperanto...».
La Papo: «Ĉu estas personoj, kiuj aŭskultas la programon?».
Pastro Lombardi: «Jes, jes, ĉefe en centra kaj norda Eŭropo. Kaj nekatolikaj...».
La Papo: «Ĉu eĉ nekatolikaj?».
Pastro Lombardi: «Jes, jes, ĝi estas ekumena servo...».

***(En Interreto: filmo de la interparolo: http://www.ikue.org/arkivo/papavizitorv.htm).***

*De la 20a de aprilo 2005 ĝis la 28a de februaro 2013.*

## LA ĈEFAJ EVENTOJ DE LA PAPADO DE BENEDIKTO LA 16a

**Romo, la 19an de aprilo 2005:** *Post du tagoj da konklavo estas la nova Papo, posteulo de Johano Paŭlo la 2a: Joseph Ratzinger, jam prefekto de la kongregacio por la doktrino de la kredo, kiu decidas esti nomata Benedikto la 16a.*

*Jen liaj unuaj vortoj al la fideluloj: «Karaj fratoj kaj fratinoj, post la granda Papo Johano Paŭlo la 2a la sinjoroj kardinaloj elektis min, simplan kaj humilan laboranton en la vinberejo de la Sinjoro. Min konsolas la fakto, ke la Sinjoro kapablas labori ankaŭ per nesufiĉaj rimedoj kaj ĉefe mi konfidas min al viaj preĝoj. En la ĝojo de la resurektinta Sinjoro, konfidante je lia konstanta helpo, ni antaŭeniras. La Sinjoro nin helpos, Maria, lia Sanktega Patrino, staras je nia flanko. Dankon!».*

### 2005

**20an de aprilo:** Unua mesaĝo en la latina lingvo, per kiu li konigas sian «programon»: agi por la unueco de la Eklezio, realigi la duan Vatikanan Koncilion.

**13an de majo:** Li anoncas la komencon de la procezo por la beatproklamo de Johano Paŭlo la 2a.

**28an de junio:** Li publikigas la «Kompendion de la Katekismo de la katolika Eklezio»

**18an-21an de aŭgusto:** Unua eksteritalia vojaĝo, la unua al Germanio: al Kolonjo, por la Monda Tago de la Junularo. Li vizitas ankaŭ la Sinagogon kaj la Moskeon.

**29an de aŭgusto:** Li renkontas la gvidantojn de la Frataro Sankta Pio la 10a (“lefebvr-anoj”).

**15an de septembro:** Li renkontas la du Ĉefrabenojn de Israelo.

**2an-23an de oktobro:** Sinodo pri la Eŭkaristio: li ŝanĝas la normojn de la Asembleo, enkondukante la liberan debaton.

**22an de decembro:** «Renoviĝo sen interrompo»: en sia parolado al la roma Kurio li tiel parolas pri la interpreto de la Dua Vatikana Koncilio.

### 2006

**25an de januaro:** Unua Encikliko: «Deus caritas est».

**24an de marto:** Nomumo de 15 novaj Kardinaloj.

**25an-28an de majo:** Vojaĝo al Pollando; li atingas Auschwitz.

**22an de junio:** Nomumo de la ŝtatsekretario, kard. Tarcisio Bertone, posteulo de kard. Angelo Sodano.

**8an-9an de julio:** Apostola vojaĝo al Hispanio.

**11an de julio:** Pastro Federico Lombardi estas nomumita direktoro de la gazetara Salono de la Sankta Seĝo.

**9an-14an de septembro:** Vojaĝo al Bavario, al la lokoj de lia naskiĝo kaj vivo.

**12an de septembro:** Perforta reago de la islama mondo post la parolado de la Papo ĉe la universitato de Regensburgo pri kredo kaj racio.

**26an de septembro:** Li ekskomunikas ĉefepiskopon Emmanuel Milingo, kiu konsekris kiel episkopojn 4 edziĝintajn pastrojn.

**23an de novembro:** Renkontiĝo kun la anglikana Primaso Rowan Williams.

**28an de novembro-unuan de decembro:** Apostola vojaĝo al Turkio. La Papo subskribas kunan deklaracion kun la ortodoksa Patriarko Bartolomeo la Unua. Li preĝas en la Blua Moskeo.

### 2007

**13an de aprilo:** Aperas la unua volumo de la libro pri «Jesuo el Nazareto».

**9an-14an de majo:** Apostola vizito al Brazilo.

**11an de junio:** Li ŝanĝas la regulojn por la elekto de la Papo: ekde nun necesos ĉiam forta plejmulto de du trionoj el la elektantoj.

**30an de junio:** Letero al la ĉinaj katolikoj; al la aŭtoritatuloj de Pekino li petas religian liberecon kaj normaligon de la rilatoj.

**7an de julio:** Li rajtigas la “eksterordinaran” uzon de la malnova latinlingva Ritaro por la celebro de la Meso (Meminiciata dekreto «Summorum Pontificum»).

**1an-2an de septembro:** Pilgrimo al Loreto:

300.000 gejunuloj bonvenigas lin.
**7an-9an de septembro:** Vojaĝo al Aŭstrio.
**21an de oktobro:** En Napolo (Italio) li lanĉas alvokon kontraŭ la loka mafio.
**24an de novembro:** Nomumo de 23 novaj Kardinaloj. Li arigas la kardinalaron por debati pri ekumenismo.
**30an de novembro:** Aperas la dua Enciklikо: «Spe salvi», pri la kristana espero.

## 2008

**15an de januaro:** Li rezignas je sia vizito al la roma ŝtata Universitato post la protestoj de studentoj kaj instruistoj.
**20an de januaro:** Preskaŭ 100.000 personoj ariĝas en Placo Sankta Petro por la «Papo-tago»: ĝi estas manifestacio por subteni la Papon post la polemikoj ĉe la Universitato.
**5an de februaro:** Publikigo de la nova versio de la preĝo de la Sankta Vendredo por la hebreoj, entenata en la malnova latinlingva roma Meslibro. La hebreaj komunumoj reagas malmole.
**15an-21an de aprilo:** Apostola vojaĝo al Usono: li intervenas ĉe Unuiĝintaj Nacioj; preĝas en "Ground Zero" kaj renkontas la viktimojn de la seksaj misuzoj faritaj de membroj de la pastraro.
**27an de junio:** Li nomumas kardinalon Agostino Vallini sian Vikarion por urbo Romo; la antaŭulo estis kardinalo Camillo Ruini
**28an de junio:** Li inaŭguras la Jaron de Sankta Paŭlo apostolo, kune kun la ortodoksa Patriarko de Konstantinopolo, Bartolomeo la Unua.
**12an-21an de julio:** Apostola vojaĝo al Sidnejo (Aŭstralio) por la Monda Tago de la Junularo; ankaŭ tie li renkontas kelkajn viktimojn de seksaj misuzoj.
**12an-15an de septembro:** Apostola vojaĝo al Francio: li restas en Parizo kaj poste en Lurdo, por la 150a datreveno de la aperoj de la Virgulino.
**5an de oktobro:** Per la legado de la komencaj frazoj de la biblia libro Genezo, li startigas dum televida elsendo la kompletan legadon de la Biblio, okazantan seninterrompe en roma Baziliko.
**5an-26an de oktobro:** Sinodo pri la Biblio. La Papo denuncas la persekutojn kontraŭ kristanoj.
**28an de decembro:** Alvoko de la Papo, por ke Israelo ĉesigu la bombadojn super la "Gaza strio".

## 2009

**24an de januaro:** Li levas la ekskomunikon de 4 "lefebvre'anoj"-episkopoj. Unu el ili, Richard Williamson, neas la Ŝoahon: tre malmolaj reagoj de la hebreaj komunumoj.
**12an de marto:** Li skribas al ĉiuj episkopoj de la mondo pri la okazaĵoj kun la "lefebvre'anoj", rekonante kelkajn erarojn, sed esprimante ankaŭ ĉagreniĝon pro la netoleremo liarilate.
**17an-23an de marto**: Apostola vojaĝo al Kamerunio kaj Angolo.
**28an de aprilo:** Li vizitas la trafitojn de tertremo en la centritala regiono Abruco. Li omaĝas al la tombo de Papo Celestino la 5a, lasante sian paliumon.
**8an-15an de majo:** Pilgrimado al Sankta Lando, Jordanio, Israelo kaj Palestinaj Teritorioj. Li vizitas la Moskeon de Amano, la Memorlokon de la Holokaŭsto kaj lasas preĝon en la Plormuro.
**19an de junio:** Li inaŭguras la Jaron de la Pastreco, dediĉitan al la beleco de la pastra servado.
**21an de majo:** Pilgrimo al San Giovanni Rotondo (Italio); li preĝas ĉe la tombo de sankta Pio el Pietrelcina.
**7an de julio:** Aperas la tria Encikliko: «Caritas in Veritate».
**17an de julio:** Dum la somera ripozperiodo li falas kaj lia dekstra manartiko frakturiĝas.
**6an de septembro:** Vizito al Viterbo kaj Bagnoregio (Italio).
**26an-28an de septembro:** Apostola vizito al Ĉeĥa Respubliko.
**3an-24an de oktobro:** Sinodo de la Episkopoj dediĉita al la Eklezio en Afriko.
**8an de novembro:** Li iras al Brescia (Italio) kaj memorigas Papon Paŭlon la 6an.
**9an de novembro:** Estas publikigita la apostola Konstitucio "Anglicanorum coetibus", kiu elaŭdas la petojn de la anglikanaj fideluloj – inkluzive de edziĝintaj pastroj kaj episkopoj – kiuj deziras eniri la katolikan Eklezion.
**21an de novembro:** Plia renkonto kun la anglikana Primaso Rowan Williams.
**21an de novembro:** Li parolas al 260 artistoj en la Siksta Kapelo.
**3an decembro:** Renkonto kun la rusa Prezidanto Dmitrij Medvedev; estas anoncita la starigo de kompletaj diplomatiaj rilatoj de la Sankta Seĝo kun la Rusa Federacio.
**17an de decembro:** Li reduktas je laika statuso la eksan Ĉefepiskopon Emmanuel Milingo.
**19an de decembro:** Li rajtigas la proklamon de la

“heroecaj virtoj” de Pio la 12a kaj Johano Paŭlo la 2a, kio plirapidigas ilian beatproklamon.

**24an de decembro:** Demenculino faligas la Papon la nokton de Kristnasko.

**27an de decembro:** La Papo tagmanĝas kun la malriĉuloj prizorgataj en Romo fare de la Komunumo de Sankta Eĝidio.

## 2010

**17an de januaro:** Vizito al la Ĉefsinagogo de Romo, 24 jarojn post Johano Paŭlo la 2a.

**15an-16an de februaro:** Renkonto kun la Episkopoj de Irlando pri la seksaj misuzoj.

**14an de marto:** Vizito al la luterana paroĥejo de Romo.

**19an de marto:** Letero al la irlandaj katolikoj pri la problemoj de la seksaj misuzoj.

**17an-18an de aprilo:** Apostola vojaĝo al Malto.

**1an de majo:** Li anoncas, ke komisaro regos la ordenon “Legianoj de Kristo”.

**2an de majo:** Vojaĝo al Torino (Italio) por la elmontro de la Mortotuko.

**11an-14an de majo:** Apostola vojaĝo al Portugalio: Lisbono, Fatimo kaj Porto.

**4an-6an de junio:** Apostola vojaĝo al Kipro, por la livero de la labor-dokumento de la Sinodo pri Proksima Oriento.

**4an de julio:** Vizito al Sulmona (Italio).

**5an de septembro:** Vizito al Carpineto Romano (Italio) por la 200a datreveno de la naskiĝo de Papo Leo la 13a.

**16an-19an de septembro:** Apostola vojaĝo al Britio.

**3an de oktobro:** Vizito al Palermo (Italio).

**10an-24an de oktobro:** Sinodo de la Episkopoj dediĉita al Proksima Oriento.

**12an de oktobro:** Li starigas la Papan Konsilion por la akcelo de la nova Evangelizado. Unua prezidanto estas Ĉefepiskopo mons-ro Rino Fisichella.

**20an de oktobro:** Li anoncas Konsistorion por la nomumo de 24 novaj kardinaloj.

**6an-7an de novembro:** Apostola vojaĝo al Hispanio: vizito de la Pilgrimloko de Santiago de Kompostela kaj de Barcelono kun konsekro de la Baziliko de la Sankta Familio.

**11an de novembro:** Publikigo de la apostola Instigo «Verbum Domini».

**23an de novembro:** Aperas la libro-intervjuo de Peter Seewald, «Lumo de la mondo. La Papo, la Eklezio kaj la signoj de la epokoj». En ĝi estas la respondo pri la ebleco de la papa rezigno.

## 2011

**10an de marto:** Aperas la dua volumo de la libro pri «Jesuo el Nazareto. Ekde la eniro en Jerusalemon ĝis la Resurekto».

**16an de marto:** Li verkas mesaĝon al la Prezidanto de la itala Respubliko Giorgio Napolitano okaze de la 150-jariĝo de la unuiĝo de Italio.

**22an de aprilo, sanktan Vendredon:** Por la unua fojo, ekde kiam li estas Papo, li partoprenas en televida elsendo por intervjuo per demandoj el pluraj mondolandoj.

**1an de majo:** Beatproklamo de Johano Paŭlo la 2a.

**7an-8an de majo:** Vojaĝo al Venecio kaj Akvilejo.

**13an de majo:** La Papo rajtigas la publikigon de Instrukcio «Universale Ecclesiae» por la apliko de la normoj pri celebro de la Meso laŭ la malnova Ritaro.

**16an de majo:** Aperas la cirkulera Letero pri seksaj misuzoj de la pastraro, per kiu oni petas al ĉiuj Episkoparaj Konferencoj de la mondo redakti la gvidliniojn por batali la fenomenon.

**21an de majo:** La Papo havas televidan kontakton kun la internacia kosma stacio, orbitacianta ĉirkaŭ la Tero. Li multe amuziĝas spektante la “flugantajn” kosmonaŭtojn kaj objektojn.

**4an-5an de junio:** Apostola vojaĝo al Kroatio por la nacia kunveno de la familioj.

**19an de junio:** Vizito al Respubliko Sanmarino kaj al Montefeltro.

**29an de junio:** La Papo solenas la 60an datrevenon de sia primica Meso.

**18an-21an de aŭgusto:** En Madrido okazas, je la ĉeesto de la Papo, la Monda Tago de la Junularo.

**11an de septembro:** La Papo estas en Ancona (Italio) por la nacia Eŭkaristia Kongreso: li tagmanĝas kun la provizore haltigitaj laboristoj pagataj per la ŝtata salajrohelpa kaso.

**22an-25an de septembro:** Tria apostola vojaĝo al Germanio; la Papo alparolas la germanan Parlamenton.

**9an de oktobro:** Vizito al la suditalia regiono Kalabrio.

**17an de oktobro:** Starigo de la Jaro de la Kredo, kiu komenciĝos la 11an de oktobro 2012.

**27an de oktobro:** En Asizo la Papo gvidas la

Tagon de medito, dialogo kaj preĝado por la paco, 25 jarojn post la Interreligia Tago de Johano Paŭlo la 2a.

## 2012

**18an de februaro:** Konsistorio por la nomumo de 22 kardinaloj.

**23an-29an de marto:** Apostola vojaĝo al Meksikio kaj Kubo. Post la reveno ekmaturiĝis en la Papo la ideo rezigni je la petra servado.

**13an de majo:** Vizito al kelkaj lokoj de la itala regiono Toskanio: Arezzo, La Verna, San Sepolcro.

**25an de majo:** Skandalo «vatileaks», eksplodinta post la eldono de libro kun sekretaj vatikanaj dokumentoj, kulminas per la aresto de la papa ĉambra helpanto, Paolo Gabriele.

**1an-3an de junio:** La Papo estas en Milano (Italio) por la 7a Monda Renkontiĝo de la Familioj.

**26an de junio:** Vizito al la zonoj de la centritalia regiono Emilia Romagna, trafitaj de tertremo.

**9an de julio:** Vizito al la domo de la verbitaj pastroj en Nemi (apud Romo).

**15an de julio:** Vizito al urbo Frascati (Romo).

**14an-16an de septembro:** Apostola vojaĝo al Libano, por la livero de la postsinoda apostola Instigo de la Sinodo pri Proksima Oriento.

**4an oktobro:** La Papo estas en Loreto (Italio), en la 50a datreveno de la vizito de beata Papo Johano la 23a al la tiea fama pilgrimloko. Li konfidas al la Dipatrino la Jaron de la Kredo, kiu komenciĝos la postan 11an de oktobro — en la 50a datreveno de la komenco de la 2a vatikana Koncilio kaj en la 20a datreveno de la promulgo de la Katekismo de la Katolika Eklezio — kaj kiu daŭros ĝis la 24a de novembro 2013.

**7an-28an de oktobro:** La Papo gvidas la Sinodon pri la nova Evangelizado.

**8an de oktobro:** Li proklamas Doktoroj de la Eklezio sanktajn Johanon de Avilo kaj Hildegardan de Bingen.

**10an de novembro:** Per meminiciata Dekreto li starigas la Papan Akademion pri Latineco.

**11an de novembro:** Meminiciata Dekreto pri la karitata servado.

**21an de novembro:** Aperas la libro «La infanaĝo de Jesuo», per kiu li konkludas sian trilogion pri Jesuo el Nazareto.

**24an de novembro:** Konsistorio por la nomumo de 6 novaj kardinaloj.

**12an de decembro**: La Papo komencas ĉeesti en la populara retejo Tŭitero, kun la konto @Pontifex.

**22an de decembro:** Li donas indulgon al sia eksa ĉambra helpanto Paolo Gabriele, kondamnita je 18 monatoj da enkarcerigo pro la ŝtelo de dokumentoj el la papa loĝejo.

## 2013

**7an de januaro:** Videomesaĝo al la katolika Eklezio en Kamboĝo, okaze de la nacia kongreso pri la 2a Vatikana Koncilio.

**18an de januaro:** La Papo donas la «Eklezian Kunulecon» al la nova Patriarko de Aleksandrio de la koptoj, lia beateco Ibrahim Isaac Sidrak.

**22an de januaro:** Aŭdienco kun la ĝenerala sekretario de la centra Komitato de la Komunista Partio de Vjetnamio.

**1an de februaro:** La Papo donas la «Eklezian Kunulecon» al la nova Patriarko de Babilono de la ĥaldeoj, lia beateco Louis Raphaël I Sako.

**11an de februaro: Dum Konsistorio por kelkaj beatproklamoj, Benedikto la 16a faras sian deklaron por anonci sian rezignon je la petra servado.**

**13an de februaro:** Kortuŝitaj fideluloj aklamas la Papon dum la unua ĝenerala aŭdienco post la anonco pri la rezigno.


**17an de februaro:** 150.000 fideluloj ĉeestas en Placo Sankta Petro por la unua Anĝeluso de la Papo post la rezigno-anonco.

**17an-23an de februaro:** La Papo kun la roma Kurio kaj la personaro de la Papa Domo faras spiritajn ekzercojn, gvidatajn de kard. Gianfranco Ravasi, Prezidanto de la Papa Konsilio de la Kulturo.

**24an de februaro:** Lasta anĝeluso de la papado de Benedikto la 16a.

**27an de februaro:** Lasta ĝenerala Aŭdienco.

**28an de februaro:** Benedikto la 16a per helikoptero atingas la restadejon en Kastelgandolfo.
Je la roma horo 20a komenciĝas la periodo de la Vakanta Seĝo.




Ekde la antikva epoko ĝis hodiaŭ
ĉiuj Papoj, kiuj rezignis (aŭ devis rezigni) je sia paŝtista servado.

# Ili forlasis la sojlon de Petro

La respondo de Benedikto la 16a en la libro-intervjuo *Lumo de la mondo* estis eksplicita. Al demando de ĵurnalisto Peter Seewald («Sekve, ĉu estas imagebla situacio pro kiu vi taksas taŭge, ke la Papo rezignu?») li diris: «Jes. Kiam Papo atingas la klaran konscion, ke li ne plu estas kapabla fizike, mense kaj spirite plenumi la taskon konfiditan al li, tiam li rajtas, kaj en kelkaj cirkonstancoj ankaŭ devas, rezigni».

Envere, la historia rekonstruo de la kazoj, kiam interrompiĝis papado antaŭ la morto de la Papo, rekondukas nin al malmultegaj figuroj kaj neniel al situacio kiel tiu, kiu estiĝis post la decido de Benedikto la 16a.

Je la komenco de la Eklezio, kiam ankoraŭ la predikado de la apostoloj estis vivanta realaĵo memorigata per rektaj atestoj, ni trovas **Papon Klementon:** en la listo de la episkopoj de Romo, verkita de Ireneo de Liono, li estas indikita kiel tria posteulo de Petro post Lino kaj Anakleto (aŭ Kleto). La informoj ne koincidas inter si koncerne la precizajn datojn de lia papado: laŭ Eŭzebio de Cezareo li postsekvis Anakleton en la 12a jaro de la regado de imperiestro Domiciano, t.e. en la jaro 92 (*Historia Ecclesiastica,* III, 15). Sed Hieronimo raportas, aldone al la menciita, ankaŭ la tradician informon, laŭ kiu Klemento estis rekta posteulo de Petro. Epifanio el Salamis levis la demandon, kial samtempulo de la apostoloj enviciĝis nur pli poste en la roma episkopeco kaj li hipotezis, ke la apostoloj aranĝis la sinsekvon de siaj anstataŭantoj por la regado de la roma Eklezio, dum ili engaĝiĝis en la apostola servado. Epifanio supozas, surbaze de la Letero de la Eklezio de la Romanoj al tiu de la Korintanoj (kp. 54, 2) – kiu estas, laŭtradicie, verko de Klemento, kvankam, en la realo, ne ekzistas pruvoj pri tio. En tiu teksto respeguliĝus la persona starpunkto de la aŭtoro, Klemento mem, kiu, por ne estigi gravajn problemojn interne de la komunumo, sindetenus el ĉiuj episkopaj funkcioj, ĝis li estus devigita surpreni ilin post la morto de Petro, Lino kaj Anakleto.



Temas pri kunteksto, pri kiu nepras uzi la us-modon, ĉar mankas necesaj historiaj bazoj. Ankaŭ ĉar – ĝi estas la starpunkto de la modernaj historiistoj – almenaŭ ĝis la 2a jarcento la gvidanta rolado de la Eklezio de Romo apartenis al kolegio de sacerdotoj, pli ol al superrega unuopulo.

Post Klemento, **Pontiano**, la 18a episkopo de la Eklezio de Romo. La dato de la komenco de lia papado estas fiksita, per konjektado, je 230. La plej fidinda informofonto, la *Liberia Katalogo* (listo de la romaj episkopoj, verkita de anonimulo en la 4a jc.) diras, ke lia papado daŭris kvin jarojn, du monatojn kaj sep tagojn. En 235 Pontiano estis deportita al Sardinio kune kun sacerdoto Hipolito. La malmoleco de la kondamno aperas en la teksto de ĝia motivado: *in insula nociva* (al noca insulo),



per kiu probable oni celis la malsanigan klimaton kaj la kondamnon al trudlaboroj en minejo. La *Katalogo* mencias la daton de la rezigno de Pontiano, okazinta en Sardinio (*in eadem insula* = en la sama insulo) la 28an de septembro, kaj la ordinon, kiel lian posteulon, de Antero, la 21an de novembro.

Pontiano – jen hipotezo entenita en la *Enciklopedio de la Papoj* – «eble estis instigita de admirinda realismo, ĉar li taksis, ke li certe ne revenos vivanta el la deportejo, kaj ke la manko de paŝtisto damaĝus la ŝafaron. Sed apartaj cirkonstancoj povus instigi lin realigi geston el forta simbola signifo. Se sacerdoto Hipolito, ekzilita kun li, estis spirita estro de roma komunumo kontraŭa al la reganta orientiĝo, kiun personigis Pontiano, la gesto de ĉi-lasta havus plian gravecon, ĉar ĝi celis faciligi aŭ sankcii repaciĝon. Kaj se oni volus daŭrigi la konjektadojn, la elekto en Romo de Antero, greko el orienta deveno, kiel verŝajne estis Hipolito, aspektus plia malfermiteco por la rekunmeto de la diversaj konsistoj de la roma komunumo».



Kun salto de preskaŭ 3 jarcentoj, oni atingas **Papon Silverion**. Post la morto de sia patro (Papo Hormisdaso) en 523, li verkis lian epitafon, kiu perdiĝis, en kiu li laŭdegis la klopodojn repaciĝi kun Oriento kaj la revenon de Afriko al libereco. Ne estas konate, ĉu je tiu epoko Silverio estis jam pastro, ĉar la teksto ne menciis iun ajn titolon lian, sed oni scias, ke kiam mortis Papo Agapeto (en Konstantinopolo, la 22an de aprilo 536) li estis subdiakono de la Eklezio de Romo.

Lia kandidatigo al papado, trudita de reĝo Teodato, estigis, laŭ la kronikisto de la *Liber pontificalis* (aŭ libro de la papoj, kroniko pri la eventoj de la roma papa kurio laŭlonge de pli ol mil jaroj), fortan malkontenton ĉe la pastraro, reage al la malalta rango de la kandidato en la eklezia ĥierarkio. Por la unua fojo subdiakono aliris la papadon. Silverio aktivis en la lukto kontraŭ monofizismo (teologia doktrino pri Kristo, kreita en Egiptio de Eŭtiko en la 5a jarcento, kiu diras, ke Jesuo havas nur unu naturon, t. e. la dia naturo) kadre de la Koncilio, kiu okazis ekde la 2a ĝis la 4a de junio 536 kaj kiu kondamnis dum kontumaco Antimo'n, malelektante lin bizanca episkopo de Trebizondo (Trabzon). Ĉi tiu subpremado de monofizismo ĝenis imperiestrinon Teodora, kiu decidis neniigi Silverio'n: ŝi sendis leteron al generalo Belisario, per kiu ŝi ordonis al li eksigi la Papon.

Belisario obeis, arigante la sacerdotojn, la diakonojn kaj ĉiujn pastrojn, por ke ili elektu Vigilio'n, kiu estis konsekrita la 29an de marto 537, kvankam la *Liber pontificalis* diras pri li, ke li restis diakono ĝis la morto de sia antaŭulo. Laŭ la sama verko, Silverio estis ekzilita en insulo Palmarola, en la Ponza insularo sude de Romo, kaj reduktita je monaĥeco. Alia aŭtoro, Liberato, male parolas pri unua ekzilo en Patara, en Licio (aŭ Likio), kaj pli malpli la samon diras historiisto Prokopio, ĉar laŭ li Belisario sendis la Papon, akuzitan pri perfido, «al Grekio».

Al tute alia epoko apartenas **Benedikto la 9a**, Teofilatto de la Grafoj de Tuskolo, reganta inter oktobro 1032 kaj septembro 1044. Li reprezentis la simbolon de la kompleta mondumigo kaj ekspluado de la papa povo. Dum siaj komplikaj travivaĵoj, la Papo estis elpelita el Ro-




mo, kien li revenis antaŭ ol esti definitive venkita. Ne certaj estas liaj naskiĝdato kaj familia deveno; oni povas tamen diri, ke li ne estis knabo je la momento de la elekto, kiel oni firme diris dum longa tempo. La *Annales Romani* raportas, ke en 1044 estiĝis ribelo kontraŭ la Papo, kiu estis forpelita. Tuj poste oni elektis kiel Papon la episkopon de Sabina, Johanon, kiu surprenis la nomon Silvestro la 3a, kiu post 49 tagoj estis siavice eksigita fare de Benedikto la 9a, kiu intertempe realiris la papadon.

Benedikto la 9a oficis ekde la 10a de marto ĝis la 1a de majo 1045, kiam li lasis la taskon al Johano Graciano, kiu fariĝis Papo kun la nomo Gregoro la 6a.

La enviciĝo okazis laŭ maniero kutima en tia epoko: per aĉeto kontraŭ mono. Ankaŭ la nova Papo ne restis longe: aŭtune de 1046 atingis Italion reĝo Henriko la 3a, kiu arigis Koncilion en Sutri, kunvokante la 3 Papojn, rolulojn de la eventoj de la antaŭaj 2 jaroj. Silvestro la 3a ne partoprenis; Gregoro la 6a, la nura ĉeestanto el la tri, agnoskis sian kulpon, kvankam deklarante sian bonintencon. Ankaŭ Benedikto la 9a ne iris al la Koncilio, kaj dum la tuj posta roma Koncilio en 1046 li estis deklarita eksigita fare de la nova Papo Klemento la 2a. Sed post la abrupta morto de ĉi-lasta, la 9an de oktobro 1047, Benedikto la 9a sukcesis denove aliri la papadon, per la subteno de Bonifaco de Canossa kaj profitante la fakton, ke reĝo Henriko la 3a estis for de Italio. Tamen li mallongtempe regis. Henriko petis al Bonifaco akompani al Romo la novan Papon, kiun li mem elektis, Poppone de Brixen, kiu alprenis la nomon Damaso la 2a. Post komenca ŝanceliĝo, Bonifaco devis cedi fronte al la minacoj de la reĝo kaj malinkline akompanis la germanan Papon al la eterna urbo, kaŭzante la definitivan forigon de Benedikto la 9a, kiu rifuĝis ĉe la kasteloj de Sabina, oriente de Romo. Tie Teofilatto taksis sin ankoraŭ reganta, en indignoplena izoliĝo.

Post la kazo de Celestino la 5a – pri kiu vi povas legi en aparta artikolo – estas la lasta Papo, kiu forlasis la sojlon de Petro: Angelo Correr, filo de la venecia patricio Nicolò di Pietro, Papo ekde 1406 ĝis 1415 kun la nomo **Gregoro la 12a**. Per sia rezigno (petita de la Koncilio de Konstanco) li klopodis startigi la solvon de problemoj, eksterordinare komplikaj: jaroj da juraj, militaj, diplomatiaj bataloj kaj disputoj kun la kontraŭpapoj Benedikto la 13a, esprimo de la frakcio de Avinjono, kaj Johano la 23a (kies nomon reuzos en 1958 Papo Roncalli), kiuj konsistigis la skismon de Okcidento.



Marte de 1415 li nomumis Carlo Malatesta sian prokuriston, delegante samtempe proprajn reprezentantojn kun la povo arigi lianome la Koncilion. Se la koncilia asembleo akceptus tian proceduron, Gregoro aperus kiel la unika laŭleĝa Papo; temis pri formala rekono, tamen grava. La Koncilio taksis, ĉiuokaze, oportune akcepti la peton, por liberigi la vojon al unueco. Tial, la 4an de julio 1415, kardinalo Dominici legis la buleon pri la kunvoko de la Koncilio kaj post tio Malatesta oficiale anoncis la abdikon de Gregoro la 12a. La Koncilio decidis doni al li la titolon "kardinalo episkopo de Porto" (urbeto ĉe la marbordo de Romo), kun rango tuj post la Papo, kaj la dumvivan rolon de papa legato en la limprovinco de Ancona. Tion, kio okazis en Konstanco la 4an de julio 1415, Benedikto la 12a eksciis la 19an de julio kaj la postan tagon, dum la lasta Konsistorio, kiun li volis arigi, li senvestiĝis el la simboloj de la papa povo, surmetante la kardinalan veston. Ekde januaro 1416, refariĝinta Angelo Correr, li vivis en Recanati, kie li mortis la 18an de oktobro 1417. La 11an de novembro de tiu sama jaro, kun la elekto de Oddone Colonna, kiu fariĝis Papo Marteno la 5a, la granda skismo estis definitive solvita.

# La mallonga apero de Celestino la 5a




*L'Aquila (Italio), la 28an de aprilo 2009: 20 tagojn post la terura tertremo, kiu en tiu regiono mortigis 309 personojn, Papo Benedikto la 16a lasas la papan paliumon sur la ĉerko de Papo Celestino la 5a, en la preskaŭ tute detruita baziliko de Collemaggio.*

Li estas la figuro plej konata ankaŭ pro la mencio pri li en la "Dia Komedio" de Danto *(«la hom', kiu konceptis fari rezignon grandan malkuraĝe», Infero, kanto 3a, verso 60, traduko de Enrico Dondi)*, kvankam el necerta interpreto. Li nomiĝis Pietro Angeleri, ankaŭ nomata Pietro di Morrone, ĉar antaŭ la papado li vivis dum multaj jaroj kiel ermito sur monto Morrone, apud Sulmona, centra Italio. La estonta Celestino la 5a naskiĝis en 1209 aŭ komence de 1210: la plej fidinda fonto pri lia vivo, *Vita Coelestini,* diras, ke li havis 87 jarojn,7 kiam li mortis la 19an de majo 1296. Li devenis el suditalia Molizo, tiam provinco de la Regno de Sicilio.

Petro estis elektita Papo la 5an de julio 1294, dum la konklavo en Perugia, posteulo de Papo Nikolao la 4a, kies morto (1292) lasis vakanta la apostolan sidejon dum pli ol 2 jaroj. La 11an de julio oni sendis al li en urbo Sulmona ambasadoran mesaĝon. La 18an de julio li akceptis en sia ermita ĉelo la senditojn de la kardinalaro kaj kardinalon Pietro Colonna; Karolo la 2a Anĵuo atingis Sulmona'n la 21an de julio por omaĝi al la ĵuselektito kaj de tiu momento li ne plu forlasis la novan Papon. La reĝo tuj ordonis la pretigon de la kronado de Celestino en L'Aquila, urbo, kiu apartenis al lia regno. La 28an de julio, rajdante azenon mantenitan de la reĝo mem, la Papo eniris la urbon. La 29an de aŭgusto 1294 en la baziliko de sankta Maria de *Collemaggio*, konstruita laŭ lia volo mem kaj konsekrita en 1288, li estis kronita Papo. Ĉeestis 2 reĝoj, kardinaloj kaj nobeluloj, aldone al svarma fidelularo, pli ol 200.000 personoj laŭ la tiamaj kronikoj. Tiun saman vesperon li havigis al ĉiuj fideluloj de Kristo la eternan plenan indulgencon, nomatan *"La Perdonanza"*, kiu ankoraŭ hodiaŭ ripetiĝas ĉiujare en L'Aquila: tiuj, kiuj, post konfespreno kaj sincera pento, en la periodo inter la vesperaj preĝoj de la 28a de aŭgusto ĝis la vesperaj preĝoj de la tago 29a, festo de sankta Johano Baptisto, vizitas devotece la bazilikon de *Collemaggio*, ricevas samtempe la forigon de la pekoj kaj la absolvon de la puno.

La nova Papo konfidis sin senkondiĉe al reĝo Karolo la 2a Anĵuo, nomante lin "marŝalo" de la estonta Konklavo kaj ratifante lian traktaton kun reĝo Jakobo de Aragono pri la posedo de insulo Sicilio.

Ankoraŭ laŭ konsilo de reĝo Karolo, li translokigis la papan kurion el L'Aquila al Napolo kaj tie li ekloĝis en eta ĉambro, tre sobre aranĝita, kie li ofte izoliĝis por preĝi kaj mediti. Verŝajne dum liaj oftaj meditoj pli kaj pli firmiĝis en li la decido forlasi sian taskon. Lin subtenis la opinio de kardinalo Caetani, fakulo pri kanona juro, kiu taksis

tute laŭleĝa la rezignon je la papado. Do, kvar monatojn post la kronado, malgraŭ la pluraj klopodoj de Karolo la 2a malkonvinki lin, la 13an de decembro 1294, Celestino la 5a dum Konsistorio legis buleon porokaze pretigitan, kiu antaŭvidis la eblecon por Papo rezigni fronte al gravaj motivoj. Poste li eldiris la formulon de la rezigno.

Historiistoj estonte klarigos, ke la papa buleo, kiu listigis ĉiujn motivojn por papa rezigno, estis verkita laŭcele ĝuste de kardinalo Caetani, kiu ekvidis la eblecon mem fariĝi Papo, multe pli frue ol li supozis. Ankoraŭ hodiaŭ la oficiala historiografio donas pridiskutatajn opiniojn pri la gesto de Celestino la 5a.

Dek unu tagojn post lia rezigno, la



Konklavo en Napolo elektis la novan Papon: kardinalon Benedetto Caetani, el urbo Anagni. Li estis 59-jara kaj alprenis la nomon **Bonifaco la 8a**.

Li, kiu estis la realiganto de la rezigno de Celestino kaj poste de simonia (subaĉetita) papiĝo, timis skismon fare de la kardinaloj, kiuj estis kontraŭ li kaj kiuj povus reelekti Celestinon'n. Pro tio li ordonis la areston de la maljuna monaĥo: ĉi-lasta, eksciinte tiun decidon, klopodis fuĝi al Oriento, sed la 16an de majo 1295 li estis kaptita kaj enfermita en la **fortikaĵo de Fumone** (je preskaŭ 69 km. sude de Romo), en kiu li mortis la 19an de majo 1296, onidire murdita laŭ ordono de Caetani.


Lia unua tombo estis en la monaĥejo de la apuda urbeto Ferentino; poste lia ĉerko estis portita al la baziliko de *Collemaggio.* Li estis sanktproklamita la 5an de majo 1313 fare de Klemento la 5a, laŭ instigo de la franca reĝo Filipo la 4a Kapetido. La liturgia memoro pri li soleniĝas la 19an de majo.

Ĉi-jare, la 5an de majo, en la 700a datreveno de lia sanktproklamo, liaj korpaj restaĵoj ricevos la paliumon, kiun Benedikto la 16a mem metis sur lian ĉerkon okaze de sia vizito al L'Aquila en 2009: gesto, kiun la amaskomunikiloj lastatempe taksas "paroliva signo" pri tio, kion Benedikto la 16a faris 4 jarojn poste.

«En la granda dramo inter *Ecclesia spiritualis* kaj *Ecclesia carnalis* (t.e. inter la kunuleco de la sanktuloj kaj la videbla socio) – skribis itala historiisto Arsenio Frugoni (1914-1970) – Celestino la 5a konsistigas mallongtempan aperon, tamen tiom rivelan pri tiu dramo, ke li fariĝis ties simbolo. Sed lia personeco konservas nedeterminecon, kiun la malnovaj biografiistoj nek la ĵusdataj historiistoj povis komplete forigi, por ekkapti la unuopajn kaj konkretajn trajtojn».

***Fumone (Italio): la prizono de Celestino la 5a en la (suba fotografio) tiea fortikaĵo.***





## 66a KONGRESO de IKUE
## 13a ĝis 20a de julio 2013, KALWARIA ZEBRZYDOWSKA, Pollando
**Ĉefa temo: “NOVA EVANGELIZADO”**

**PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO:** ĝi aperis en la pasinta EK-numero.

**KOTIZTABELOJ**

**Polaj kongresontoj, atentu:** bv. peti la aliĝilon kun tarifoj en złotoj al: ikuekongreso@gmail.com aŭ per ordinara poŝto al la adreso: Stanisław Śmigielski, ul. Ignacego Krasickiego 12/6, 47-206 Kędzierzyn-Koźle

**Tarifo A:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo (escepte de Slovenio); ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio, Malajzio, Sudkoreia Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko), Latina Ameriko, Oceanio (escepte de Aŭstralio, transmaraj teritorioj de Francio).
***Tarifo B:*** Ĉiuj mondaj landoj ne inkluzivitaj sub A.

| KONGRESA ALIĜKOTIZO (ne repagebla kaj nek transdonebla!) | | |
|---|---|---|
| | **A** | **B** |
| **ĝis la 30-a de aprilo** | 20 EUR | 50 EUR |
| **de la 1-a de majo** | 40 EUR | 70 EUR |
| **parta partopreno taga** | 8 EUR | 10 EUR |
| **parta partopreno/** | 25 EUR | 25 EUR |
| **Apogkotizo:** 50% de la plena kotizo (oni ne partoprenas en la kongreson, sed oni ricevas la kongresan dosieron) | | |
| Infanoj ĝis 8 jaroj aliĝas senpage | | |
| ne IKUEanoj krompagas la aliĝkotizon 10 EUR pli por plena partopreno. | | |

| priskribo de la ĉambro | A | B |
|---|---|---|
| 4-lita[1] | 175 EUR | 205 EUR |
| 4/5-lita kun banĉambro | 190 EUR | 225 EUR |
| 3-lita kun banĉambro | 210 EUR | 240 EUR |
| 2-lita kun banĉambro[2] | 220 EUR | 255 EUR |
| 1-lita kun banĉambro | 240 EUR | 280 EUR |

**[1] banĉambro kaj necesejo komuna — [2] prioritato al la geedzaj paroj**

**Prezo inkluzivas:** 7 tranoktojn; 7 vespermanĝojn; 7 matenmanĝojn; 6 tagmanĝojn
- bustransporton dum pilgrimadoj kaj necesajn enirbiletojn

Partaj partoprenantoj — manĝoj en la kongresejo: tagmanĝo: 7,5 EUR vespermanĝojn: 5 EUR

**Ĉiuj supre menciitaj kostoj ne inkluzivas asekuron!**

**ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ,** *bv. atente legi:*

* La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo. Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon pri la aliĝilo kaj informojn kiel atingi la kongresejon.

* La mendo de la loĝado (kompleta) estos traktata nur post la alveno de la NEPRA antaŭpago de 20%.

* Prioritaton en la mendo de du-litaj ĉambroj havoj geedzoj.

* Ni ne povos trakti hazardajn kunloĝantojn en 2-litaj ĉambroj.

* Post ricevo de la mendo, la organizantoj tuj komunikos ĉu la elektita loĝadkategorio jam estas elĉerpita.

* En kazo de ne alveno, NUR la antaŭpago por la loĝservoj estas transdonebla al alia persono, kondiĉe, ke tiu regule aliĝis kaj pagis la aliĝkotizon.
* Reston de la sumo oni povas pagi al la banka konto, aŭ surloke nur per kontanta mono, en eŭroj aŭ kontraŭ valoro en złotoj (ĉekoj kaj kreditkartoj tute ne estas akcepteblaj).
* La antaŭpago por la loĝservo pro nealveno estos redonita, nur se oni sukcesos anstataŭigi la menditan lokon.
* De la redonita sumo pro organizaj kialoj oni forprenas 10 EUR.
* La aparte menciitaj kostoj de la tag- kaj vespermanĝoj rilatas al tiuj kongresanoj, kiuj loĝos aliloke kaj deziras ĉeesti la komuna(j)n manĝo(j)n. Kiuj jam ĉe la aliĝo estas certaj pri la partoprentagoj kaj deziras mendi manĝojn, tiuj devas indiki precize la menditajn manĝojn. Surloke (ĝis la antaŭa tago) eblos mendi manĝojn. Tamen pro organizaj kialoj, oni petas, ke oni konigu al la organizantoj sian preferon maksimume ene de la 1a de julio.
* Se vi interesiĝas pri la hotelaj loĝeblecoj en la proksimeco de la kongresejo, bv. tion kiel eble plej rapide komuniki al la organizantoj.
* La prezoj estas kalkulitaj laŭ la kurzo januaro 2013
* Se vi volas kontribui al la tema parto de la programo, bv. klare skribi al kiu subteno rilatas via kontribuo. Krome, bv. sendi ĝis dek frazan resumon de la kontribuo antaŭ la 1a de majo.
* Se via kontribuo estos listigita en la programo, ĝi povus daŭri ĝis 30' kaj vi estos petata liveri skriban version de la prelego por posta aperigo.
* Surloke eblus diversajn teknikaĵojn, kondiĉe ke oni antaŭanoncu siajn bezonojn.

## PAGMANIEROJ

**BANKO:**
**Pere de la itala poŝt-banka konto**: IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000
BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX
je nomo: UNIONE INTERNAZIONALE CATTOLICA ESPERANTISTA
adreso: *Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA-RM* (Italia)
**UEA:**
***konto "ikue-v" de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo, Italio***
*Oni ne FORGESU skribi la kialon de la pago.*

***Atentu:***
1) eŭropanoj de la landoj kies bankoj aliĝas al sistemo "SEPA" ne pagas komisiojn por alsendi la monon. Oni petu informojn ĉe sia banko;
2) oni skribu precize la nomon: "Unione internazionale cattolica esperantista". Oni ne uzu mallongigojn, nek la siglon IKUE, nek alian akronimon: **oni riskas, ke la pago ne estu farita.**

## Landaj kongresaj perantoj:

**ĈEHA RESPUBLIKO**: Miloslav Šváček, Tršická 6, 751 27 Penčice, **m.svacek@seznam.cz**
**HUNGARIO:** Szép Attila, 7601 Pécs, Pf. 113, **szep.attila.mihaly@gmail.com**
Raiffeisen Bank 12071001-00674260-00100004, La sendanto indiku: KONGRESO
**SLOVAKIO:** Pavol Petrík, Na Dujave 3, 08256 Pečovská Nová Ves, **pavol907@gmail.com**

**Sekvu informojn pri la kongreso pere de: www.ikue.org/kong2013**
Fejsbuko: **http://www.facebook.com/pages/IKUE-Kongreso/271488306314727**
Tŭitero: **https://twitter.com/IKUEkongreso**
kaj Esperanto-elsendoj de la Vatikana radio: **www.radiovaticana.org**
**Oni adresu proponojn kaj demandojn al: ikuekongreso@gmail.com**

## *66a KONGRESO DE IKUE*

**KALWARIA ZEBRZYDOWSKA, Pollando, 13/20.07.2013.**

### ALIĜILO KAJ MENDILO

**Sendu rete al: ikuekongreso@gmail.com, fakse: +385 1 37 45 052 aŭ per ordinara poŝto al la adreso: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio aŭ helikpoŝte al la landa kongresa peranto**

*Ĉiu aliĝinto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon/mendilon bv. plenigi preslitere.*

| | |
|---|---|
| **PERSONA(J) NOMO(J)** | **FAMILIA NOMO** |
| **ADRESO (strato, domnumero)** | **poŝtkodo, urbo, ŝtato** |
| **NASKIĜDATO** | **TELEFONO** |
| **RETADRESO** | **FAKSO** |
| **Mi estas vegetarano: JES NE** | **Mi estas handikapito: JES NE** |
| **Mi planas alveni (dato, transportilo)** | **Mi planas forveturi (dato, transportilo)** |
| **Mi mendas servojn (metu ☑)**<br>**4-lita ĉambro** ☐<br>**4/5 lita kun banĉambro** ☐<br>**3-lita kun banĉambro** ☐<br>**2-lita kun banĉambro** ☐<br>**1-lita kun banĉambro** ☐ | **Mi estas parta partoprenanto kaj mi mendas manĝojn por la tagoj:**<br>**tagmanĝoj:**<br>**vespermanĝoj:**<br>**pilgrimoj:** |
| **Mi deziras dividi ĉambron kun** | |
| **Mi havas apartan dieton** | |
| **Al la programo mi pretas kontribui per** | |
| *Noto:* | |

Mi pagas:

- Kongreskotizon = ____ EUR
- Loĝservojn/antaŭpagon = ____ EUR
- Libervola kontribuo al la Kongresa Kaso = ____ EUR
- SUME = ____ EUR

Antaŭpagon de ____ EUR mi ĝiris al la:


☐ **Banka konto de IKUE**
☐ **IKUE-konto ĉe UEA**
☐ **landa kongresa peranto**

Dato: ___________________ Subskribo: ___________________

✂

**Polaj kongresontoj, atentu:** bv. plenigi la aliĝilon kun tarifoj en złotoj

# *Ni funebras kaj kondolencas*



**Prof-ro Georg KNAUS (1931-2012)**
Li naskiĝis la 5an de julio 1931 en Büchlberg apud Passau. Membro de IKUE, GEA kaj de la germana sekcio de ILEI. Li estis edzo de Edeltraut kaj patro de 2 gefiloj. En 1960 dank' al vigla fervojista E-grupo en Passau li konatiĝis kun E-o. Li mem fondis E-grupon en sia naskiĝurbo. Rimarkinda estis lia organizado, en 1967, de kunveno, ankoraŭ en Büchlberg, honore al L. Zamenhof, okaze de la 50a datreveno de lia forpaso. Li realigis ankaŭ eksperimenton per du klasoj de infanoj: unu lernis la anglan, la alia E-on: rezultis, ke la infanoj lernis pli rapide E-on. Kun ĉi tiu grupo li partoprenis en la 46a germana Kongreso de Esperanto en Munkeno (1968). Ankaŭ muzikon li instruis – ĉefe al infanoj kaj adoleskantoj – kun la fondo de bando de latuninstrumentoj ("Ulrichsbläser Büchlberg", kiu, ekde 1970, fariĝis pli kaj pli konata) kaj direktado de pluraj ĥorusoj dum pli ol 20 jaroj (blankaj voĉoj, preĝejaj kaj viraj ĥorusoj). Kun la paso de la jaroj li elreviĝis pri E-o ĉar li ne sukcesis fondi daŭran lokan E-grupon. Tamen li ne ĉesis korespondadi kaj gastigi esperantistojn el multaj mondolandoj. Dum sia tuta vivo li estis instruisto, ankaŭ kun tasko de vic-rektoro, ĝis pro sanstataj problemoj li devis emeritiĝi. Li forpasis en Büchlberg la 27an de novembro 2012, post longa malsano.



**Pastro MGR. Vojtěch SRNA (1932-2013)**
La 17an de januaro 2013 mortis en la Karitata Porpastra Domo en Moravce pastro - esperantisto kaj ĝisfine fidela membro de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio Vojtěch Srna. Li naskiĝis la 30an de januaro 1932 en Troubsko kaj pastriĝis la 24an de junio 1956 en Litoměřice. En sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento li aktive partoprenadis la katolikajn E-tendarojn en Herbortice, kie li gvidis kursojn de E-o. En 1979 li estis kun la tiama ĉefaranĝanto de la tendaroj Miloslav Šváček juĝita kaj kondamnita fare de la komunista justico. Dum dek jaroj ekde 1977 li ne ricevis la "ŝtatan permeson" por la praktikado de la pastraj servoj pro "malrespekto de la ŝtata kontrolo super Eklezio" en la E-tendaro. Li laboris kiel hejtisto kaj plenumis pluajn helplaborojn en malsanulejoj de Brno. En 1987 li fine povis rekomenci sian sacerdotan servadon en Vladislav kaj Střížov-Číměře kaj mallonge li priservis ankaŭ paroĥon Tasov. Ekde 1997 li estis paroĥestro en Žerotice kaj Oleksovice. La entombiga ceremonio okazis en Moravce la 26an de januaro 2012.

***Eternan ripozon donu al ili, Sinjoro, kaj senfina lumo lumu al ili, ili ripozu en paco. Amen.***

**BIBLIAJ TAGOJ en Strasburgo, Francio, 13a ĝis 17a de marto 2013 — Centre Culturel Saint Thomas, 2 rue de la Carpe Haute, 67000 Strasbourg. Informoj: Stefan Lepping, Mellinstr.5, 59457 Werl, Germanio, <stefanlepping@gmx.de> ☏(+49) (0)2922/9287098**

**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**
*La elsendoj okazas trifoje semajne en la sama* **horo 21.20 MET** (20.20 UTC)**, DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE kaj ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta. **Por aŭskulti ilin per la Interreto:**
**rekte je la indikita horo:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp
**laŭpete:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp
**arkivo:** http://www.radio-vatikana-esperanto.org — **Android:** http://rv.va/android
**i-phone/i-Pad:** http://rv.va/iphone
*Skribu al:* **RADIO VATIKANA, ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**
**Ret-poŝto:** <esperanto@vatiradio.va>. Por ricevi retpoŝte la informilon de RV: <promo@vatiradio.va>